Miguel Díaz-Canel en la pintkunsido ALBA-Petrocaribe.



La unua kuba vicprezidento voja?is al Karakaso por partopreni la pintkunsidon de la Alianco Bolivara por la Amerikoj (ALBA) kaj Petrocaribe nome de la kariba insulo.

Kiel estro de la kuba delegitaro li estis akceptita de Verónica Guerrero, vicministro pri eksteraj rilatoj por Latinameriko kaj Karibio.

Oficialaj amaskomunikiloj elstarigis la ?eeston de Kubo en tiu kunsido kongrue al la subteno de la insulo en la streboj por regiona integri?o kaj por efektiva ani?o de la Alianco, Petrocaribe kaj la komunumo de latinamerikaj ?tatoj (CELAC).

En la pintkunsido oni celas esplori la kreadon de ekonomia zono kaj plifortigi la integrigan rolon de tiuj organoj kun solidaraj programoj de kunlaboro.

La kuban delegitaron formas anka? la ministro pri ekstera komerco, Rodrigo Malmierca, la ministro pri fremda investado, energio kaj minoj, Alfredo López kaj funkciuloj de la ministerio pri eksteraj rilatoj.

La kunsido koincidas kun la 9-a fondodatreveno de la ALBA, la unua el tiuj integrigaj mekanismoj en la regiono, kiun membras Venezuelo, Kubo, Bolivio, Nikaragvo, Dominiko, Ekvadoro, Sankta Vicento kaj Grenadinoj kaj Antikvo kaj Barbudo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/8891-miguel-diaz-canel-en-la-pintkunsido-alba-petrocaribe



Radio Habana Cuba